

G46  
1.8.1981



# BELGA KATOLIKO

Oficiala bulteno de la  
**BELGA KATOLIKA LIGO ESPERANTISTA**  
(B. K. L. E.)

Nacia Sekeio de la **INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA**  
(I. K. U. E.)

## FEBRUARO 1912

ENH A V O :

Gravega Avizo — Karaj Gelegentaj — Grandega Honoro por nia B. K. L. E.  
— Je pia memoraĵo de S<sup>ro</sup> A. Van der Biest — Pri malbonaj ĵurnaloj — Ra-  
konto pri.... pantaloneto — Kroniko de I. K. U. E. — Oficialaj sciigoj —  
El Nederlanda Katolika — Adressaro de I. K. U. E. — Fondinta Komitato de  
Angla Ligo de Katolikaj Esperantistoj k. t. pl.

**REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO**

ĉe LEO HEIDENDAL

**A R E N D O N K**

# BELGA KATOLIKO

ORGANO DE

LA

Belga Katolika Ligo Esperantista  
(B. K. L. E.)



NACIA SEKCIO DE LA

Internacia

Katolika Unuigo Esperantista  
(I. K. U. E.)

REDAKCIO : Por ĉio kio koncer-  
nas la redakcion (artikoloj —  
informoj — broŝuroj — libroj —  
k.t.p.) oni sin turnu al :

ADMINISTRACIO : Por ĉio kio  
koncernas la administracion (re-  
klamoj — mensejoj — anoncoj  
— k.t.p.) oni sin turnu al :

Sro Leo Heidental, ARENDONK.

## Gravega Aviso.

Kiel Prezidanto de la tutmonda Societo, la I. K. U. E., estas mia devo averti ĉiujn Katolikajn Esperantistojn pri danĝero kiun la nuna granda disvastigo de nia internacia lingvo neeviteble naskas.

Esperanto estas lingvo oni povas skribi kaj presigi, ne nur bonaj, sed ankaŭ malbonajn verkojn. La Sankta Eklezio, kiel bonega Patrino, absolute malpermesas al siaj infanoj la legadon de malbonaj presajoj, sen speciala permeso. Tia permeso estas donata de la Ekleziaj Aŭtoritatoj nur kiam ĝi estas necesa, ĉu por ekzameni librojn k. t. pl. ĉu por ilin refuti.

Presajoj povas esti malbonaj je du vidpunktoj : Ili povas esti kontraŭ la fido, au kontraŭ la bonmoroj. La Katolikoj ne povas sen peko, legi ĵurnalojn, librojn, k. t. pl., kiuj atakas, aŭ insultas, la katolikan religion au ĝiajn ministrojn. Ni, bedaŭrinde, jam rimarkis en kelkaj esperantistaj gazetoj tre malafablajn kaj eĉ malpiajn paragrafojn havantajn eĉ insultojn kontraŭ nia Altestimata kaj Amata Patro, Lia Papa Moŝto Pio X<sup>a</sup>. Kelkfoje, sed dank' al Dio malofte, ni legis artikolojn, romanojn, historietojn k. t. pl. verkitajn esperante, kiuj, je la vidpunkto de la kristana ĉasteco tute maltaŭgis. El tiaj faktoj ni devas konkludi ke ni Katolikoj tute ne povas legi, kaj lasi inter la manoj de niaj infanoj, ĉiujn esperantistajn

presajojn. Kiel por aliaj lingvoj, tiel tute same por esperanto, la Katolikoj devas esti tre singardemaj. Bona regulo estas neniam aĉeti, ĉu ĵurnalon, ĉu libron, sen antaŭe peti la konsilon de lerta esperantisto, kiu estas santempe fidela Katoliko.

Precipe estas necese ĉiam memori la leĝon de la Sankta Eklezio, kiu devigas kiel oni diras teologie, "*Sub grave*," neniam legi au aĉeti au eĉ reteni, nerajtigatajn tradukojn de la Sankta Skribo, alivorte de la Biblio, estas nur ili kiuj post ekzameno de la Ekleziaj Aŭtoritatoj ricevis la "*Imprimatur*," ĉu de la loka Episkopo ĉu Romo Kongregacio, rajtigita por ekzameni librojn, de Lia Papa Moŝto. La kaŭzo de tiu granda singardemeco estas evidenta al ĉiu prudenta homo.

Laŭ la Katolika Kredo, la Sankta Skribo estas la Inspirita Parolo de Dio. Ĝi estas parto de la "*Depositum fidei*," donita de Dio al sia Sankta Eklezio por instrui per ĝi, ĉiujn naciojn. Do, la Sankta Eklezio povas permesi la tradukon de tiuj Diaj Orakloj, nur al bonkonataj, fidelaj, kaj kleraj Katolikoj, kaj plue, tiaj tradukoj devas esti akompanitaj de komentarioj, kaj klarigoj, pri malfacilaj tekstoj, laŭ la ordinara instruado de la Sankta Eklezio, al kiu *sole* apartenas la rajton ne erarebla defini la veran signifon de la Sankta Skribo.

AUSTIN RICHARDSON,  
Prezidanto de la I. K. U. E.

## Karaj Selegantoj.

Kun ĉi tiu unua numero de « Belga Katoliko » por 1912, la Redakcio prezentas al la liganoj siajn plej korajn bondezirojn por la nova jaro. Ke ĝi estu gracia kaj sankta por ĉiuj, kaj nia Ligo kresku kaj disvastiĝu sub la benado de la ĉiopova Dio, kaj la protektado de nia sankta Patrino Maria.

Ni do eniris la duan Ligan jaron, kaj estas interesplene ekzameni ĉu la pasinta jaro estis favora al nia Ligo kaj al nia katolika Esperantista movado.

Modesta estis nia komenco, kiel ni diris en nia revueto de la unua jaro. Jam pasis ses monatoj post la starigo en Bruĝo, de nia « Belga Katolika Ligo Esperantista », kaj nenio estis farita. Estis tiu stato, kiu ŝajnis daŭrigi dum longa tempo, kiu instigis kelkajn membrojn je la praktika laborado por la Ligo.

Je la unua placo ni trovis nian karan maljunan Prezidanton de I. K. U. E. kiel pioniron de nia naskiĝonta Ligo. Estis Abato Richardson kiu — kvankam ĉiam malforta post sia grava malsano — direktis kaj kunhelpis la unuajn nespertajn laboristojn de nia Ligo. Li fervorplena frapis je la pordo de niaj katolikaj esperantistoj, kaj kiel bona paŝtanta, alkondukis la ŝafojn al la ŝafejo. Estis li kiu kuraĝoplena deziris havigi al nia Ligo Bultenon, kaj dank'al li ankoraŭ, aperis jam en Majo 1911<sup>a</sup> la unua numero de « Belga Katoliko ». Tamen, kvankam mi ne povis diri malpli ol mi diris ĉi supre, mi bone scias ke mi jam malkontentigis lian modestecon. Tial tuj mi daŭrigos, mian ekzamenon.

Jam post laborado de nur kvar monatoj, ni ricevis la aliĝon de pli ol cent membroj, kaj inter ili ni kalkulas ekleziajn eminentulojn. Dum la Karloreĝa Kongreso ni kunvenigis niajn anojn en Bruselo, por fine elekti definitivan komitaton. Bedaŭrinde, la bela Pentekosta vetero instigis niajn membrojn forveturi, por ĝui la freŝan kamparan aeron, ĉu partopreni la postkongresan ekskurson. Tial kaŭze la kunveno ne okazis, sed estis prokrastata ĝis la 7<sup>a</sup> kongreso en Antwerpen, kie ni dufoje kunvenis.

Tie, fine, estis elektita la Komitato, dum interesplena kunveno prezidita de nia kara Abato Richardson. Tie, ankoraŭ, interkonatiĝis kaj interfratiĝis niaj anoj kun multaj fremdaj — aŭ plej ĝuste — alilandaj katolikoj, revenintaj el la Dua Katolika Kongreso en Hago.

Ĉiuj reiris hejmen post la Antwerpen' a kongreso, kun firma decido labori tutkore por nia bulteno, por varbi novajn membrojn, unuvorte, por disvastigi nian « Belga(n) Katolika(n) Ligo(n) Esperantista(n) »,

Bedaŭrinde, inter decido kaj laboro, inter kuraĝo kaj praktika agado kuŝas abismo. Tion la skribanto de ĉi-tiu artikoleto klare spertis. « Parolo ne estas oro » (Woorden zijn geene oorden) diras Nederlanda proverbo, kaj tiu proverbo estas tute prava. Kiom da belaj vortoj, kiom da gravaj promesoj, tamen en praktiko..... nenio. Ĉiuj tiuj vortoj ŝanis nur elparolitaj per la lipoj sen korkunsento. Tio ne estas kristana. Mi ankaŭ bone scias ke estas multe pli facile ricevi kaj legi bultenon, en kiu aperas liston de la novaj aliĝintoj, ol klo-podi por varbi novajn membrojn, aŭ por helpi la redakcion.

Krom tri aŭ kvar anoj, kiuj faris ĉion eblan por prosperigi nian Ligon kaj bultenon, al kiuj mi tutkore sendas miajn dankojn, mi nur ricevis.... plendajnleterojn.

Unu sciigas min ke, aliĝante antaŭ tri tagoj li ne ankoraŭ ricevis sian membrokarton — Alia, ne ricevis la numeron de « Belga Katoliko » tuj post la presado — Mi atendas baldaŭ plendojn de anoj kiuj ne ankoraŭ ricevas la.... *presotajn numerojn* ? Ankoraŭ aliaj min gratulis pri la redaktado de la bulteno, sed preferus ke ĉiu artikolo en « Belga Katoliko » havu almenaŭ tiel bonan stilon kiel la stilo de Zamenhof mem. Kvankam nia bulteno ne estas lingva revuo, ni tamen preferas ekzemplajn artikolojn je lingva kaj stila vidpunkto, kaj kun plezuro ni atendos tiajn artikolojn de niaj karaj gelegantoj.

Tamen, ĉio tio perdiĝu en la estinteco. La estonteco nur devas stari antaŭ niaj okuloj. Se ni renkontis malfacilaĵojn dum la pasinta jaro, ni povas kaj devas ilin forigi dum la estanta jaro. Vi liganoj devas plenumi vian

taskon. Ni la estraro kaj redakcio plenumis — kaj kun la Dia helpo — ĝin plenumos en la estonteco. Ni atendas de vi kunhelpadon por disvastigi nian Ligon. Al vi estas facile varbi almenaŭ unu membron. Al vi estas facile verki artikoletojn, sendi sciigojn, havigi al ni reklamanoncojn por ke nia bulteno iĝu monata. Reklamanoncojn estas necesaj por la bonfarto de revuo. Nia bulteno estas legata en la tuta Belgujo, kaj, per la interŝanĝservo en multaj aliaj landoj. Tiamaniere, la reklamanoncoj atingos plej grandan disvastiĝon.

Ni do plene fidas je vi. Post la belaj festoj de Kristnasko kaj Novjaro, ni petas vin ne forgesu vian decidon faritan genufleksante antaŭ la Betlehem' a stalo en kiu antaŭ 1912<sup>on</sup> da jaroj kuŝis nia Savinto. Ĉu vi ne aŭdis resoni je viaj oreleĵ la belajn vortojn: « Gloro al Dio en la plejalto, kaj paco sur tero al homoj bonevolemaj ». Ĉu ni, katolikoj, klopodante por nia katolika Esperanta movado, ne klopodas same por la paco?

Ni estas certaj ke vi ĉiuj prenis fortan decidon por labori dum ĉi-tiu jaro kun pli da fervoro, pli da kuraĝo kaj pli da frateco.

Nia movado multe progresas tra la mondo. Naciaj ligoj ekzistas en Nederlando — en Germanujo — en Hispanujo — en Francujo — en Aŭstrio. En Anglujo kaj Italujo estas starigitaj novaj naciaj Ligoj. Ni povas do ĝoje antaŭeniri sub la beno de nia Ĉiopotanta Dio kaj la protekto de lia sankta Patrino. Nia « Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista » estas inter bonaj manoj. Fervorplenaj, agemaj kaj kleraj estas ĝiaj Estraranoj: Pliie, la ĉeforgano de I. K. U. E. « Espero Katolika » transloĝis en Hago, la pacurbo, kie la lertega kaj agema D<sup>ro</sup> Smulders ĝia inda Redaktoro, prizorgos ĝin kun vera patra amo.

Pri nia « Tria » Lia Moŝto Mj<sup>ro</sup> Giesswein havigis al ni la plej interesajn sciigojn. Tamen ni tion preparolos en la proksima numero de nia bulteno.

Ni finas nian ĉi-tiun alvokon, peteganta niajn liganojn daŭrigi ilian ageman propagandon. Alta kaj nobla estas nia celo, kaj ĝi certe meritas la kunhelpadon kaj sindonemecon de ni ĉiuj. Baldaŭ nia Ligo iĝos

forta kaj grava Ligo, inda de sia katolika lando, sed tio nur okazos dank' al via kunhelpado.

L. HEIDENDAL.

## Grandega Honoro

POR NIA

## Belga Katolika Ligo

## Esperantista.

En la tria numero de nia Bulteno (Aŭgusto 1911a.) paĝo 6<sup>a</sup>, en la listo de la membroj de la Belga Katolika Ligo Esperantista, niaj legantoj trovos la jenan nomon « Le Rév. Père Van Rossum, Rédemptoriste, « Consultant de la Congrégation du Saint Office » Via Merulana. Romo. Nun ni havas le ĝojon anonci al niaj liganoj ke dum la novembra monato 1911<sup>a</sup>, Nia Sankta Patro, Lia Papa Moŝto Pio X<sup>a</sup>, altigis la Patron Van Rossum al la altega Ofico de Kardinalo-Diakono de Sankta Cesar.

Al Lia Eminenco ni, la membroj de la B. K. L. E. humile, sed grandkore, sendas niajn fervorajn gratuloln kaj ni kuraĝas esperi ke Lia Kardinala Moŝto ne rifuzos al ni la grandegan honoron konservi lian nomon en la arkivoj de nia Katolika Ligo. Fine, ni petegas nian noblan membron bonvolu donaci al ni, kaj al nia movado, Lian Altsatatan benon.

Je la nomo de la Belga Katolika Ligo Esperantista.

La Prezidanto.

Ankaŭ la Redakcio de « Belga Katolika » grandkore gratulas Lian Kardinalan Moŝton kaj petas Lian Eminencon beni nian entreprenon por ke ĝi ĉiam pli kaj pli disvastiĝu.

L. H.

(Ne Korektita)



Je la pia memorajo de S<sup>o</sup> Amatus Van der Biest  
Prezidanto de la Sepa Kongreso.

« Benataj estas la mortintoj, Kiuj en la Sinjoro mortis ».

« Apokalipso XIII-14. »

La tuta Esperantistaro suferas grandan perdon per la bedaŭrinda morto de S<sup>o</sup> Van der Biest. La eksprezidanto de la Belga Ligo, la ĉefa organizanto kaj Prezidanto de la Sepa Internacia Kongreso en Antverpeno estis vera Esperantisto. Lia tuta animo estis plena je la intima ideo de Esperantismo : la Frateco universala. Lia ago tute ne limiĝis al propagando de la Internacia lingvo en sia propra lando, kvankam je tiu vidpunkto, li tutkore kaj ageme laboris. Ne, la agado de Van der Biest estis internacia, tutmonda. Lia nomo estas konata kaj estimata en la tutmonda Esperantistaro. Pro tio lia morto certe kaŭzos grandan doloron en ĉiu lando kie ekzistas samideanoj, kaj hodiaŭ, tio volas diri en ĉiu civilizita lando.

Sed, se la esperantista familio perdis emimentulon, mi persone perdis karan, amatan amikon, Pro tio, mi petas la permeson diri kelkajn vortojn pri la intima karaktero de tiu bona, honesta, simpatia viro.

Kiel Prezidanto de la Belga Ligo Esperantista, li devis publike kaj oficiale sin montri absolute neŭtrala. — Li estis la Prezidanto de la belgaj esperantistoj, ne konsiderante la diversajn opiniojn de ĝiaj membroj, kaj mi estas certa ke ĉiu samideano belga atestos kun mi, ke li ĉiam uzadis tiun neŭtralecon lojale, kaj takte. Sed mi havis la plezuron esti lia amiko intima. Mi do povas certigi ke *person*e li estis sincera kristano kaj fidela katoliko. Inter ni ekzistis perfekta unuiĝo de sentoj kaj de konvinkoj pri ĉiuj tiuj gravegaj temoj vekitaj de la vortoj : Religio, devo, la vivo kaj la morto. Ofte ni parolis kune pri tiuj solenaj temoj kaj ĉiam ni konsentis inter ni. Kvankam lia situacio de Prezidanto malhelpis lin ageme parto-

preni en nia I. K. U. E., li tutkore aprobis la agadon de siaj katolikaj gesamideanoj, kaj ĉiam, oportune, dediĉis kelkajn kuraĝigajn vortojn al la katolika movado en « Belga Esperantisto » kies Redaktoro li estis.

Neniam mi forgesos la amindan kaj karitplenan viziton kiun li faris al mi dum mia danĝera malsano en la katolika hospitalo en la Hago. Certe, unu el la plej ĝojaj tagoj de tiu neniam forgesebla monato, dum kiu ĉiuj el miaj amikoj, volis, ŝajne, elmontri ĝis la fondo la bonecon de siaj kristanaj koroj, estis tiu bela tago kiam mia kara Amatus forveturis de Antverpeno ĝis La Hago, por pasigi kelkajn horojn kun sia maljuna amiko.

Je la komenco de Januaro miavice mi pasigis unu Dimanĉon kun li. Nun li estis malsana, sed mi tute ne suspektis ke tiu interparolo devus esti la lasta inter mi kaj li. Dum tiu lasta vizito ni parolis tre intime, kaj estas pro tio ke mi ne dubas komenci tiun artikolon per la vortoj de la Sta Skribo, « Benataj estas la mortintoj kiuj en la Sinjoro mortis. » — Amatus Van der Biest estis fidela kaj konvinkita katoliko, kaj, kiel la antikva roma soldato, kiam la Estro alvokis lian nomon li provis humile sed trankvile respondi « *adsum*... ».

Estas agrabla sciigo por niaj tutmondaj membroj ke li esprimis sian altaprobbon al nia nova eldono de « Espero Katolika » kaj ke li ankoraŭ esprimis sian indignon kontraŭ la malinda kondukaĉo de la « liberpensuloj » en Antverpeno dum la « Sepa ». Mi bone memoras liajn vortojn : « Kara amiko, ekzistas tie kaj ĉi tie en la mondo homaĉoj kiuj vivas en atmosfero de malamo kaj

malestimo, kompatu ilin, ni kristanoj, kaj preĝu por ili ».

Kaj nun mi petas, mi petegas al la geesperantistoj de la tuta mondo, sed precipe al la katolikoj, montri nian amon por nia kara kaj eminenta amiko, katolikmaniere, t. e. preĝante por la sankta kaj perfekta ripozo de lia bela animo. Li ankaŭ, ne dubu, ne forgesos nin. Estas por ni konsolanta penso ke niaj samideanoj mortintaj, « in Domino » daŭrigas helpi nian kristanan Esperantan movadon, kaj alproksimigas la alvenon de tiu benata tago kiam ni formos ĉiuj nur « Unu ŝafaro sub unu Paŝtisto ».

AUSTIN RICHARDSON.

\* \* \*

Je la nomo de « Belga Katolika Ligo Esperantista » mi plenumas la malĝojan taskon prezenti al la familio Van der Biest-Andelhof miajn plej sincerajn kondolencojn. Mi petas niajn anojn memori la karan mortinton en iliaj preĝoj. Estas certe la plej bona,

la plej agrabla maniero lin honori.

Ni ĉiuj « Belgaj Katolikanoj » konis la indan Prezidinton de la Sepa Kongreso kaj de la Belga Ligo Esperantista. Agema propagandisto, lerta Esperantisto, ni ĉiam kun plezuro aŭdis lian voĉon dum niaj naciaj kongresoj. Por nia katolika Esperanta movado li multe sin interesis. Ĉar kristano li estis kaj kristano li mortis.

Aminda kaj amata de ĉiuj, li ĉiam estis servopreta kaj sindona por ĉiuj. Li estis pioniro agema de nia Zamenhofa lingvo, kaj dank' al li, nia « Belga Ligo Esperanta » disvastiĝis tra la lando.

La estimata familio Van der Biest perdis edzon kaj patron, kaj nia koro sentas ilian doloron pri tiu ĉi adiaŭ-diro, sed la tuta esperantistaro perdis **samideanan eminentulon**, kaj tial la tuta esperantistaro malĝojas, ĉar la nevenkebla morto rabis al Esperantismo nian Amatus Van der Biest.

L. HEIDENDAL.

## Pri malbonaj ĵurnaloj.

Dum tiuj-ĉi tagoj de febra vivo, dum tiu-ĉi nia bela kaj hela dudeka jarcento, grava demando internacia kaj ĉiujn katolikojn interese, kiel ruĝa suno de batala mateno, levigas al nia senlima horizonto.

Kiel mi, karaj legantoj, vi scias ke la kredo kaj la religiaj ideoj nuntempe estas en tre granda danĝero pro la multaj kaj fortaj atakoj de la nekreduloj aŭ liberpensuloj.

Kvankam, kiel antikva ŝtonego en la mezo de la maro, staras la Katolikismo kiu pereji ne povas, ni devas atenti.

Ĉar malfeliĉe multaj de ĝiaj anoj, sekvante vojon kiun al ili montras la eraro sin deturnas de la bela kaj sankta kredo de siaj infanjaroj. Kaj tra la mondaj plezuroj, al la Kristo ne plu pensante, ili marŝas ĝis la fino, ĝis la malhela morto, kiu, laŭ la dia diro, venos kiel nokta ŝtelisto.

La kaŭzon de la malgaja okazintaĵo vi eble demandos.

Sed, mi vin petas, pripensu momenton. — « Ĉu la ĵurnaloj.... ? »

Jes amikoj, jen estas la respondo. La ĵurnaloj, la malbonaj, kaŭzas tiujn domaĝojn. Vi rapide komprenos.

Ian tagon, laŭ rakonto, ricevinte ĵurnaliston, Lia Papa Moŝto preninte plumon kaj ĝin beninte ĝin donis al sia vizitanto.

Kio estas la signifo de tiu-ĉi faro ?

Grandega, ne vere ? ĉar nuntempe kio estas la plej granda potenco eksistanta ? ne estas la oro, ĉu alia afero ; ne, tute ne, sed estas la sola ĵurnalo, la presa aro. La nuna scivolemeco estas pli granda ol dum la pasintaj tempoj.

Ĉar, diru, kie estas urbo, vilaĝo, eĉ dometo kie la ĵurnalo ne eniras, ne estas legata ? La riĉulo en sia salono, la oficisto irante al oficejo, la vojaĝanto en la vagonaro, ĉiuj legas ĵurnalon ĉar ĉiuj volas kaj ŝatas koni la lastajn okazintaĵojn, ĉu religiajn, ĉu politikajn, aŭ aliajn. Sed bedaŭrinde la presitaj artikoloj estas kelkfoje ne por ĉiuj ĝindaj. Kion mi diras ? Artikoloj ?

Jes, ekzistas ĵurnaloj kiujn nenia bonpensanta homo nur povas rigardi. Ĉiuj el iliaj titoloj, el iliaj vortoj estas kiel nigra veneno, la animojn mortiganta. En Belgujo, lando kies plej granda loĝantaro estas, dank' al Dio, katolika, la plej granda nombro de ĵurnaloj devus ankaŭ same esti katolikaj. Sed, tutkontraŭe, la nekatolikaj ĵurnaloj tie nombre superiĝas la aliajn.

Kial ?

Unue : ĉar la laboremece de la malpiuloj estas pli granda ol la nia : Aŭskultu, vespere, matene, en la bruselaj stratoj, ekzemple : la vendistoj ekkrias la titolojn de multaj malbonaj ĵurnaloj kaj katolika titolo estas nur malofte aŭdata.

Tiuj-ĉi ĵurnaloj ankaŭ sin pli bone informas pri la okazintaĵoj kaj bone tiel plenumas la scivolemecon. Kaj malfeliĉe — ĉar ĉiu homo kaŝas en si mem *iom da eĉ malgranda besta* instinkto — personoj ŝatas legi malmoralajn rakontojn, artikolojn k. t. p.

Due : ĉar kelkaj katolikaj sinjoroj malkuraĝas *publike* legi ĵurnalon je sia opinio. Ili eble ruĝiĝus. Jen, vera infanaĵo, ne vere ?

Tiel mi esperas esti klariginta iome la kaŭzojn de la potenco de la malbonaj ĵurnaloj. Sed, vi eble dirus, kio grava estus se mi ĉetus numeron de ili, nur unu numeron.

Certe, unu numero ne nin domoĝas.

Sed tiu-ĉi rezono ne estas sole la via.

Multaj personoj kiel vi rezonas. Tiel ankaŭ tiuj-ĉi multaj personoj aĉetas multajn numerojn de la ĵurnalo, kaj ju pli da ĵurnaloj estas vendataj, des pli ĝi estas potenca kaj konata, des pli ankaŭ ĝiaj malbonaj ideoj trovas anojn kaj tiel multaj personaj ankaŭ malboniĝas.

Do, katolikaj samideanoj, se vi volas la pliboniĝon de Belgujo ;

la pligrandiĝon de via religio ;

la triumfon de viaj opinioj ;

la bonan konduton ĝeneralan ;

se vi volas vivi kaj morti kiel filoj de Dio ;

*neniam aĉetu* kaj klopodu por ke *neniu aĉetu eĉ unufoje* malbonan ĵurnalon au libron.

Estu tia nia decido por ĉiam !

Tiel ni eniras nian krucan militon kontraŭ la malbona presaro : niaj okuloj ali-

gataj al nia brila standardo, la krista kruco, ni ne timu la batalojn, sed ni ekkriu kiel iam niaj prapatroj : « Dio tion volas ! »

ROBERT DE LEENER,  
(Bruselo)

## Rakonto pri... pantaloneto.

Estas vintro. La vetero estas malvarma, la ĉielo griza. Oni sentis neĝon en la aero.

Ĉe unu el la ekstremajoj de la « Nova Ponto » en Parizo, amaso da malpaciencaj personoj atendis la finon de veturilembaraso.

En tiu grupo, maljuna sed ankoraŭ lerta sinjoro, ŝajnanta iom pli kvieta ol la aliaj, rigardis komplete laman almozulon sidantan ĉe la angulo de l'ponto. Apud tiu malriĉulo staris malgranda knabo aĝa je nur sep aŭ ok jaroj, kies okuloj estis fiksitaj, kiel hipnotigitaj al la almozpetanto, sed tiu-ĉi ne eĉ rimarkis la infanon.

Kun rozkoloraj vangoj, grandaj nigraj okuloj, senordigitaj haroj, vestoj montrantaj la plej kompatindan malriĉecon, kun la dekstra maneto en sia poŝo, tiel, pripensanta, staris la knabo, sed ne longan tempon. Tuj li eliris el sia poŝo kupran monereton ĝin konsideris atente, kvazaŭ li volus eternan adiaŭon diri al ĝi, kaj, rapide, donas ĝin al la almozulo. Tiam, indiferenta, la infano sekvas la popolamason kiu nun moviĝas.

— Jen knabeto imitinda de multe da riĉuloj, pensis la sinjoro, mi sekvos lin.

Post dekkvaroj da paŝoj, alia embarasa amaso, kaj ankaŭ alia almozulo. Denove la knabo posteniĝis antaŭ la malriĉulo, enigis sian maneton en sian poŝon, staras kelke da minutoj pripensanta, — iom pli longe ol la unuan fojon — kaj, eligante monereton el la poŝo, la infano ĝin ĵetis en la ĉapelon de la almozulo.

Tiam rigardante siajn du malplenajn manetojn, li ŝajnis diri : « Bone, miaj amikoj, vi faris vian devon ».

La observanto haltigis la infanon kaj, afable, demandis al li pri la kialo de lia almozo.

— « Estas por nova pantoloneto » respondis la knabo, ne mallevante siajn klarajn okulojn : « Vidu, Sinjoro, kiel elusita estas la mia; kaj ĉar mi faris komision por najbarino kaj ricevis de ŝi iom da mono, mi ĝin redonis al malriĉuloj : tio venigos al mi novan pantoloneton. »

Tiuj vortoj estis tiel simple kaj sincere diritaj ke ne eĉ rideto venis sur la lipojn de la demandanto :

— « Sed, karega infano, kiel do povos du kupraj moneretoj donitaj de vi al pli malriĉa ol vi mem, venigi al vi novan pantolonon ? »

— « Ho ! mi ne tre bone povas tion klarigi al vi, sed mia granda fratino Antonjo, kiu iras katekisman, diris al mi ke la malriĉuloj estas la komisiistoj de la Bona Dio, kaj ke se oni al ili donas monon, ili tuj iras diri al Li, tion kion oni bezonas. Do, nun mi atendas. »

La Sinjoro estis tre kortuŝita per tiaj naivaj vortoj; forviŝante larmon el sia okulo, li diris :

— « Vi estas tute prava, karuleto, Dio en la Ĉielo jam konas vian bezonon, kaj Li sendis min por aĉeti belan pantoloneton al vi. »

Li kondukis la infanon en grandan magazenon el kiu, post duono da horo la knabo eliris tute provizita de novaj vestaĵoj.

La infano, sen miro, rigardis la belajn novaĵojn, kvazaŭ ili estus al li ŝuldataj, kaj, kiam li estis preta, li premis la manon de sia bonfaranto kaj diris :

— « Mi dankas vin, Bona Dio ! »

El : « Un peu de bon français »  
Espesantigita de L. Solvyns.

## KRONIKO DE I. K. U. E.

### Espero Katolika.

De multaj jaroj « Espero Katolika » estas bona konatulo en Esperantistaj rondoj, honorata de amiko kaj malamiko.

Laŭ la alta idealo de sia energia fondinto, Abato Em. Peltier, ĝi iam fariĝu centra organo de la katolikaro Esperantista, revuo

malfermata al ĉiuj katoliksciencaj demandoj, informilo oficiala, grava ilo por la reunuiĝo de la kristanaro.

Al realigado de tiu celo li laboradis senlace, plenespere ; li vidis la nombron de la abonantaro ĉiam kreskanta, la influon de sia revuo pligrandiganta. Li bataladis, li verkadis... ĝis kruela morto forrabis lin ! Lia laboro ne finita !....

Tamen, la bazo de li metita, estis tiel solida, ke lia laboro ne mortis kun li.

Energie, senlace, nun aliaj posteuloj daŭrigas la propagandon ! Gravega dato : Pasko 1910. Unua kongreso internacia de katolikoj Esperantistaj en Parizo ! Definitive starigo de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista. La propagando de E. K. efikas, prosperas : Esperantistoj el 15 landoj aŭskultas la vokadon, unuaj el ĉiuj Esperantistoj de la tuta mondo kunvenas en kongreso, kie Esp-o estas uzata nur kiel interkomunikilo, kiel rimedo facila, oportuna por servi al la « Katolikaj interesoj. » Gravega dato : Aŭgusto 1911. Dua Kongreso Intern-a de Katolikoj Esp-aj.

« Espero Katolika » estas elektita kiel Oficiala Organo de I. K. U. E. De nun, ĉiu ajn Katolika Esperantisto, kiu deziras esti regule informata pri la agado de I. K. U. E. pri la movado Internacia katolika, nepre devas legi « E. K. »

La nomoj ja de ĝiaj nunaj direktoro (Ab-o Richardson) kaj redaktoro (Dr-o Smulders) estas garantio, ke E. K. renkontendas belan estontecon.

Grava nombro da novaj, kompetentaj Esperantistoj, pastroj kaj laikoj kunlaboros, regule ensendos artikolojn. Siavice, E. K. komence de Januaro 1912 decidis enkonduki pagitajn artikolojn.

Plie : se la abonantaro pligrandiĝos, E. K. ankaŭ pligrandiĝos : la intenco estas baldaŭ eble eldoni 64 paĝojn anstataŭ 32.

Pro ĉio tio, plenkonfide ni alvokas al ĉiuj Esperantistoj :

« Ne prokrastu, sed tuj abonu al E. K. Helpu ankaŭ Vi igi ĝin plej grava internacia revuo ! »



Tria Internacia Katolika Kongreso  
de I. K. U. E. en Budapeŝt (Hongarujo).

« La Oka » universala kongreso esperantista en Krakovo okazos 11—18 Aŭgusto 1912. La 23-a Internacia Eŭkaristia Kongreso en Vien okazos 12—15 Septembro 1912; do bedaŭrinde unu monaton pli malfrue. Se la du kongresoj okazus je datoj pli proksimaj unu al alia, la katolikaj povus viziti kaj « La Okan », kaj « Nian Trian », kaj la Eŭkaristian Kongreson.

Verŝajne « Nia Tria » okazos baldaŭ post « la Oka ». Monsinjoro D-ro Aleksandro GIESSWEINN, la prezidanto de « Nia Tria », sciigas nin, ke « la 20-an de Aŭgusto estas en Hongarlando granda festo, de nia patrono S. Stefano; tio unuflanke estus interesa afero por la fremdlandanoj, vidi la amason de la popoloj alvenantaj el diversaj partoj de la lando; sed aliaflanke je tiu okazo estas pli malfacile trovi loĝejon. Ni opinias ankaŭ, ke estus prefereble tuj post « La Oka » fari vojaĝon tra la monto de la alia Tatra, la plej bela pejzaĝo de la Hungarlando en la konfino de Galicio kaj Hungarlando kaj komenci « Nian Trian » la 22-an aŭ 23-an.

En la Marta numero de *E. K.* ni donos pli detalajn informojn. Oni promesis alsendi al *E. K.* regule artikolojn pri « Nia Tria » kaj pri la kongresurbo kaj kongreslando. Baldaŭ la kongreskarto estos preta kaj aĉetebla (verŝajne 2 Sm.) kaj la sekretariokasisto de la Kongreso sendos al ni ĉiunmonate la liston de la pagintaj aliĝintaj kongresanoj, por publikigi ĝin en ĉiu numero de *E. K.*

Niaj legantoj do havu ankoraŭ iom da pacienco. La loka Komitato fervore laboras kaj sciigos al ni baldaŭ ĉiujn sciindaĵojn. Aŭkaŭ la temoj pritraktotaj jam estas elektitaj kaj ni esperas baldaŭ konigi ilian enhavon, por ke la kongresantoj povu prepari sin kaj praktike partopreni al la laboro farota.

Vivu « Nia Tria »!

**Lasta Sciigo:** Lia Eminenco Kardinalo Claudius Vaspary, Primato de Hungarlando, akceptas la altan Protektantecon de « Nia Tria ».

## OFICIALAJ SCIIGOJ.

Starigo de Akcia Societo, nomita:  
« Internacia Eldoniga Societo »  
« ESPERO KATOLIKA ».

P-ro RICHARDSON kaj D-ro SMULDERS sciigis en la Nov-a N-ro de *E. K.* (p. 287), ke ili « aĉetis *Espero Katolika* de la nuna posedanto, por kaj je nomo de I.K.U.E., celante kiel eble plej baldaŭ starigi internacian societon, konsistantan el membroj de I.K.U.E. kaj tiam transdoni la posedaĵon de *Espero Katolika* al tiu Societo ».

Post akurata ekzamenado de la posedaĵoj kaj ŝuldoj de *E. K.* kaj post konsiliĝo kun ni leĝa konsilanto, lia ŝtatkonsilanta moŝto Mr. TH. BORRET, ni elektis por laŭleĝa starigo ce suprenomita societo Notarion.

Tiu ĉi pristudis serioze la demandon kaj jam pretigis projekton de Regularo, kiu post nia aprobo devas akiri la reĝinan aprobon (aprobos de la Nederlanda Registaro). Post tio la akcia societo estos definitive starigata en la oficejo de la notario kaj aperos sciigo pri la starigo kaj ĝia Regularo en la Nederlanda Ŝtatgazeto (espeble en Nederlanda *kaj en Esperanta* lingvoj).

Estas nun dezirinde, kiel eble plej baldaŭ sciigi pri la partoprenontoj, kiuj aĉetos akciojn. Ĉi sube ni transskribas kelkajn donitaĵojn el la projektita Regularo, por ke niaj legantoj povu prijuĝi la karakteron kaj seriozecon de la starigota societo kaj decidi fariĝi akciuloj.

La intenco estas starigi akcian societon, ne nur por pagi al la antaŭa posedanto de *E. K.* la aĉetsumon kaj por propagandi kaj pligrandigi *E. K.*, sed ankaŭ por favori kaj ebligi la eldonigon de ĉiuspecaj katolikaj presitaĵoj (libroj, broŝuroj, adresaroj, jarlibroj, specialaj revuoj k.t.p.).

La *societa kapitalo* estas 10 000 spemilojn (12100 guldenoj = holandaj florenoj), dividita en 200 akcioj je nomo po 50 Sm. (f 60.50), el kiuj je la stariga dato estos eldonataj kaj plenverŝitaj 40 akcioj = 2000 Sm. (la kvinova de la societa kapitalo laŭ postulo de la Nederlanda leĝaro).

La akcioj estas je nomo, t. e. la pose-

danto de ĉiu akcio estas unu konata persono, kies nomo kaj adreso estas enregistrita. Do oficiale nur unu konata persono povas esti posedanto de iu nedividebla akcio. Kompreneble pli ol unu persono povas aĉeti *kune* akcion (ekz. 5 personoj pagas ĉiu 10 Sm. = kune 50 Sm.), sed nur unu persono estas enregistrita kiel posedanto.

La akciuloj devas esti membroj de I.K.U.E. kaj abonantoj de *Espero Katolika*, en kiu aperos la oficialaj sciigoj de la A. Societo.

Ĉiujare dum la internacia katolika kongreso okazos la ĝenerala kunveno de akciuloj (aŭ iliaj riprezentantoj). Prezidos la Prezidanto de I.K.U.E. aŭ lia de li elektita anstataŭanto. La labora programo estos antaŭe anoncita. La akciuloj havas unu voĉon po akcio; tamen unu akciulo ne povas havi pli ol 6 voĉojn.

El la gajno de la A. Societo la akciuloj ricevos maksimume 4% da interezo (rentumo).

La Estraro de la Akcia Societo konsistas el du *Direktoroj*. Tiuj ĉi estas kontrolataj de la Centra Komitato de I.K.U.E., kiu elektas tri *Kontrolantoj* (Nederlande « Kommissarissen »).

La du direktoroj estas la ĉefredaktoro kaj administranto de « *Espero Katolika* », kaj estas elektitaj de la ĝenerala kunveno de Akciuloj, laŭ propono de la Centra Komitato de I.K.U.E.

La tri kontrolantoj kontrolas la direktorojn; ili havas la rajton tiel kune, kiel aparte viziti ĉiutempe la direktorojn kaj trakontroli ĉiujn leterojn, librojn kaj donitaĵojn kaj la akcian kason. La direktoroj devas doni al ili ĉiujn deziritajn informojn. La kontrolantoj raportas pri ĉio en la ĝenerala kunveno de akciuloj. K. t. p.

Jen kelkaj eltiraĵoj pri ĉefajoj el la projekta regularo de la A. S. Krom tio ĉiu eĉ plej malgranda detalo estas priskribita kaj oni povas doni ĉiun konfidon al tiu ĉi laŭleĝe starigota akcia societo.

Finante ni alvokas la I.K.U.E.-membrojn aĉeti akciojn. Ne nur ili apogos « *Espero Katolika* », sed ili samtempe ebligos la eldonigon de *katolikaj* verkoj en Espe-

ranto, kiuj bedaŭrinde estas tiel malmultaj kaj ĝenerale sensignifaj kompare je la multaj gravaj verkoj en Esperanto ĝisnun aperintaj.

La stariga sumo (40 akcioj) devas esti pagataj *antaŭ la 1-a de Aprilo*. Ni esperas, ke tiuj, kiuj enskribigis sin *provi-zore* dum « *Nia Dua* » en Hago (Aŭg 1911), nun *definitive* enskribigos sin kaj ke aliaj imitu ilian ekzemplon, por ke antaŭ la 1-a de Aprilo la 40 akcioj estu plenverŝitaj. La nomojn de tiuj, kiuj konsentis esti akciuloj, ni publikigos en la Marta numero de *E. K.*

Mi estas preta doni ĉiujn deziritajn informojn al interesigantoj.

D-ro SMULDERS,  
Schijndel (Nederlando).

## El Nederlanda Katoliko

Nova Grava Aprobo de « *Nia Dua* »

En ĵus ricevita letero de P-ro Szureck ni legas ĉi suban leteron, al li skribitan de la episkopa sekretario D-ro Francisko Czyzewicki je nomo de Lia Episkopo D-ro Josefo Sebastiano Prelczar en Przemysl (Galicio-Aŭstrio :

*Respektinda Pastra Moŝto !*

Lia Ekcelenco favoras katolik-esperantan movadon, kaj konstatinte, ke Esperanto vekas nuntempe pli kaj pli interesigon, je ĝi esprimas deziron, ke via pastra Moŝto skribu enhavriĉan artikolon (pole) pri okazinta kongreso de Katolikoj-Esperantistaj en Hago; la katolika redakcio de « *Echo de Przemyskie* » (Ĥo el Przemysl) publikigos ĝin plezurege. Krom tio Lia Ekcelenco donacas al via Pastra Moŝto Sian freŝdate eldonitan pole verkon sub titolo : « *Defendo de Katolika Kredo* » por traduki kaj publikigadi ĝin laŭvice per kelkaj artikoloj en *Espero Katolika*. Estus dezirinde traduki kaj publikigi esperante ankaŭ duan gravegan verkon de Ekcelenco nome : « *Pio IX kaj tempo de Lia Pontifika regado.* »

Mi alligas por VI sentojn de la vera es-  
timo kaj fato.

Przemysl, 55-11-11.

P-ro D-ro Fr. CZYZEWICKI.

Ni ĝojas, ke povinte aperigi en la antaŭa  
numero de « Nederlanda Katolika » la grava  
komunikajon de Monsinjoro Kardinalo Mer-  
cier, hodiaŭ denove ni povas publikigi la  
apobron kaj grandan interesigon de iu epis-  
kopo. Ni ne dubas, ke ankaŭ ĉi tiu sciigo al  
multaj alportas la konvinkon pri la granda  
utilo de internacia lingvo pro la katolikismo.

LA REDAKCIO.

## Adresaro de J. K. U. E.

Per la decido de « Nia Dua » elektita ĝe-  
nerala sekretario de I. K. U. E. kaj en tiu  
kvalito ŝarĝita fari ĉion eblan, kio povas  
servi al la baldaŭa presigo de *adresaro*,  
montrante la nomojn kaj adresojn de ĉiuj  
katolikaj pastroj kapablaj preni konfesojn  
en Esperanto kaj internacilingve plenumi  
aliajn devojn katolikpastrajn, mi apelacias  
la kunlaboreman Esperantistaron, tiun senton  
katolikigotan de ĉiu ajn el niaj samreligiaj  
Esperantianoj, por la senprokrasta realiĝo  
de la supredirita adresaro

Mi afable petas niajn laŭdindajn kaj ŝata-  
tajn kunhelpontojn, ke ili bonvolu adresi  
siajn sciigojn tiel; Al S-ro **Frans Knaa-  
pen. Tilburg.**

“*Espero Katolika Nov. 1911.*”

*Noto de la Redakcio:* Ni jam sendis al  
S-ro Knaapen adresaron de « **Belga Kato-  
lika Ligo Esperantista** ». Tamen se kelkaj  
el niaj legantoj dezirus rekte korespondi kun  
nia Direktoro ĝenerala, ni petas ke ili tion  
faru sen prokrasti.

L. H.

## FONDINTA KOMITATO

DE LA

## Angla Ligo de Katolikaj Esperantistoj.

Prezidanto:

Rev. P-ro H. EGBERS.

Sekretario:

S-ro. C. A. CARROLL,  
34, Bedford Street,  
Stockton-on-Tees.

Komitatanoj:

Rev. P-ro. J. Dawson, S. M.;

Rev. P-ro. R. Taylerson;

Rev. T. H. J. Carroll;

S-ro. H. F. Hoveler;

S-ro. W. Mackay;

S-ro. M. Heron.

### Progreso de la Katolikismo.

Itala verkisto. S-ro M. SARDELLI eldonis  
en Bologna broŝuron pri la progreso de la  
Katolikismo en diversaj landoj dum la  
jarcento 1800—1900.

Nombro da Katolikoj en 1800. Nombro da Katolikoj en 1900

Anglujo . . .	120.000	2.180.000
Germanujo . . .	6 000.000	20.321 441
Nederlando . . .	800.000	1.822.000
Svisujo . . .	420.000	1.300.000
Rumenujo . . .	16.000	150.000
Bosno-Herzegewino	25 000	398.0 0
Bulgarlando . . .	1 300	28.000
Servujo . . .	1.000	20.000
Grekujo . . .	15 000	44.000
Rusujo Tiel ĉi en nur 4 jaroj okazis	230 000	konvertigoj.
Afriko . . .	3 000	850.000
Azio . . .	3 000	4 600 000
Unuiĝintaj Ŝtatoj	40 000	22 587.079!!
Kanado . . .	160 000	2 250 000
Aŭstralio . . .	zero	1.600 000

## Oni Rikoltaskion oni Semas!

GEESPERANTISTOJ,

Se dum la Somero, vi deziras en via ĝardeno belajn florojn kaj sur viaj tabloj bonĝustajn legomojn, aĉetu ĉiam viajn semojn ĉe la bonkonata firmo :

**J. VAN DE VELDE-VAN LUNEN**

negociisto en Semoj

starigita en la jaro 1865

« IN DE RAAP »

Geite straat, 28, *Mechelen*.

(Prov. Antwerpen)

Oni korespondas Esperante.

### Atentu Geesperantistoj.

La plej efika kuracilo por la tuso kaj ĉiaj malsanoj de la gorgo, brusto aŭ bronkoj, estas la mondkonataj pasteloj :

## Spa Goudron

haveblaj ĉe multaj apotekistoj kaj *rekte de la elpensinto*, S-ro. Desonay, Spa, Belgujo, en beleta skatoleto je 60 spesdekoj = fr. 1.50.

Abato Richardson skribis al S-ro. Desonay de Bruselo : « Korajn dankojn pro viaj pas-  
» teloj « SPA GOUDRON ». Dank' al ili mia  
» bronkita tuso malaperis preskaŭ ensorĉe ».

### Geesperantistoj,

Se vi deziras havigi la plej perfektan Gramofonon, mendu la lastan elpenson, t. e. la Gramofonon sen trumpeto kaj sen pikilo. La safiro de « Pathé » anstataŭas kaj multe superas la malnovan pikilon. Multaj Pastroj, Kolegioj k. t. p. sendas laŭdemajn leterojn al la Fabrikistoj. Petu cirkulerojn de la Société Française des Machines Parlantes, 89, Boulevard Brune, Paris.

## Interŝanĝantoj internaciaj, atentu !

La mondkonata Asocio U. E. A. kreis novan fakon kies celo estas plifaciligi kaj certigi la internacian korespondadon inter esperantistoj.

La nomo de tiu-ĉi fako estas : « **Universala intersanga asocio** ». La fakestro estas S<sup>ro</sup> Michel Lévy. (7. Rue Porte-à-Meuse, — St-Mihiel — Meuse-Francujo) La U. E. A. havas apartan bultenon kiel senpagan aldonon de « Esperanto ».

Pri pluaj sciigoj, sin turnu al : S<sup>ro</sup> R. De Leener, Konsulo de U. E. A. por junuloj kaj interŝanĝo. 69, rue Neuve — Bruxelles. —

# INTERNATIONAL CORRESPONDENCE EXCHANGE.

(I. C. E.)

Monata jurnalo enhavanta artikolojn en Esperanto kaj en diversaj lingvoj. Organo por la Interŝanĝo de poŝtmarkoj, kaj korespondado per ĉiuj lingvoj, la Abono = frkj. 2,50 jare. (1 Sm.) Oni sin turnu al la Redakcio: Avenue du Moulin, 16, Forest-Bruxelles.

## PROPONOJ POR INTERKORESPONDADO.

Oni petas la korespondantojn jam cititajn, kiuj ne plu deziras korespondi, tion sciigi al la Redakcio kiel eble plej baldaŭ.

N. B. Estas devo je honoro respondi al ĉiu korespondanto almenaŭ unufoje.

S<sup>ro</sup> Bernardo M. Serra, C. O. P. de Vilaforta. Vich. Hispanujo.

S<sup>ro</sup> Vidikvoski, 2833, Livingston St Philadelphia, Usono.

S<sup>ro</sup> G. Van Oijen, 76, Engelenburgstraat, Den Haag, Nederlando.

S<sup>ro</sup> O. Tromm, 14, Schulstrasse, Charlottenburg, Germanujo.

Pastro G. Saccardi, Castalpino, Sienna, Italujo.

Pastro Risto M. Popovich-Cupick, Danolovgrad, Montenegro.

S<sup>ro</sup> Methodi Therzianoff, Macedona librejo, Sofia, Bulgarujo.

S<sup>ro</sup> Trajc'e Ĉakarevic, Lyceo Imperia, 302, Uskub, Turkujo.

S<sup>ro</sup> J. Mendrkievič, Doktoro, 52, Długa Str. Krakovio, (Aŭstrio).

S<sup>ro</sup> A. B. Seitov, 36, Učelnaja Omsk, Azia Rusujo.

S<sup>ro</sup> J. Merino, Berabeŭ, Argentina Respubliko.

La membroj de la Grupo « Zamenhof », sin turni al S<sup>ro</sup> Richardson, 121, Rue du Marais, Bruselo.

La membroj de la Grupo « Antaŭen », sin turni al la Prezidanto S<sup>ro</sup> E. Baez, Montenegro Strato, 13, Bruselo.

S<sup>ro</sup> Lambert Dederichs 53, Rue des 4 vents, Bruselo.

Pastro Decoene, Roman Catholic Church, Brandon (Man.) Canada. Povas nur doni adresojn, ne persone korespondi.

S<sup>ino</sup> Doktorino Biske, 69 por la Grupo de Spa, Hôtel de la chaîne d'or. Povas doni multajn adresojn.

S<sup>ro</sup> Robert De Leener, Rue Neuve, Bruselo.

La grupo de Basel, Svisujo. Adreso: Sro Rusterholz, Prezidanto 22, Marschalkenstrasse.

F-ino Maud Sewell, Whitehall Cottage, Bishops Stortford, Anglujo.

S-ro Wallace Mackay, 22, Coniston Avenue, Newcastle-on-Tyne, Anglujo.

S-ro T. Tchacarevitch, Lycée Imp' Ottoman, Uskul, Turkujo.

S-ro G. N. Appleton, Lynchburg, Va, United States N. America.

S<sup>o</sup> Petro Stolk, 32 Waterloostraat, den Haag, Hollande (precipe kun gekatolikoj).

D<sup>ro</sup> Marko Pavlovič, reĝa, trib-jugisto. Temes var. Hongrie. I. P. K kaj L.

Rev. P. Primavesi, St Bridgeis Catholic Church Warrington, Angleterre (li povas doni adresojn).

F<sup>ino</sup> Ina Crafer, 6, Hannover Road, Norwich, Angleterre.

Rev. Pastro Desray, Profesoro, Ancenis France.

Rev. Pastro Dol. Valensole, Basses Alpes France, I. P. K.

F<sup>ino</sup> Elly Hanau, 32 Moritzstrasse, Germanujo, Wiesbaden, I. P. K.

F<sup>ino</sup> Anna Köhler, 52 Casselerstrasse, Wolfsanger bei Cassel, Allemagne.

Miss Campell Brown Olenlosia, St Davids Street Lyttleton, New Zealand, I. P. K.

S<sup>o</sup> J. L. Stanyan, Montpelier, Vermont Etats Unis, Amerique.

# La Centra katolika Esperanta Oficejo

« ZAMENHOF »

## AREN DON K



Akceptas mendojn por ĉiuj  
Esperantaj libroj.

Vendas Esperantajn verkojn,  
Gramatikojn, lerno kaj legolibrojn  
Esperantistajn insignojn  
k. t. p.

---

### Kelkaj verkoj el la « Librejo »

---

Spirita Juvelaro . . . . .	fr. 2.20
Katolika Preĝaro . . . . .	fr. 2.60
La Kvar Evangelioj . . . . .	fr. 1.60
Hebrea Kalendaro . . . . .	fr. 0.50
Fabiola . . . . .	fr. 3.80

k. t. pl.

---

Adresu ĉiujn mendojn al :

La Centra Katolika Esperanta Oficejo « Zamenhof »  
AREN DON K

# LIBREJOJ Esperantistaj

---

A. J. Witteryck, Presisto-Eldonisto, Brugge.  
Spineux & C<sup>o</sup> Rue du Bois Sauvage, Bruxelles.  
Belga Esperanta Oficejo, Vondelstraat, 20, Antwerpen.  
Franca Esperanta Oficejo, Rue d'Angoulême, 20. Paris.  
A. N. Govers, Westeinde, 6, Den Haag.

---

## HOTELOJ

---

COURTRAI : « Hôtel du Nord » Je la stacidomo, Kunvenejo por Esperantistoj.

---

Au Moulin d'or, Rue d'Assaut, Bruxelles. Esperanta Kunvenejo.  
Hôtel Louis Le Grand 2, Rue Louis le Grand, Paris. En belega loko,  
apud avenue de l'opéra.

Hôtel Métropole, Brussel.

La plejgranda hotelo en Belgujo, 500 ĉambroj kaj 150 ĉambraroj kun banejoj.

Oni parolas Esperante.

---

LONDONO : Tre rekomendinda kaj komforta, vere « ESPERANTA-HEJMO ».  
Sinjorino O' Connor « Esperante House », 17, St. Stephens Square. Bayswater,  
London, W. Tre moderaj prezoj.

---

---

## Rekomendindaj Firmoj

---

Sinjoro Leo DE COENE-HAUTEKEETE, Rue Savary, Courtrai.  
Fadenoj — Stupoj — Kotonoj spinataj k. t. pl. — Oni parolas Esperanton.

Notariejo de Sinjoro BOSSAERT, Courtrai.

Pension-Lernejo por Fraŭlinoj. « Les Dames de Saint-Nicolas » Courtrai kaj  
Dixmude. Oni petu prospekton al la Respektinda Superulino.

Strumpaĵoj : ESPERANTISTOJ, aĉetu ĉiam ĉe la bonkonata firmo Soj. MATHIEUX  
kaj Filoj : 49, Marché aux Poulets, BRUSELO. Delegito por Belgujo de U. E. A.

Sinjoro VERHAUT, Presisto en Courtrai.